


# LA JUNA VIVO

DUŜEMAJNA  
ORGANO

POR LA  
JUNULARO



Redakcio kaj Administrado:  
West-Graafdiijk (N.H.)  
Nederlando.

Ĝironumero 209354 Nederlando.

Nederlando: jarabono f 0,75  
Unuobla ekz. f 0.03  
duobla ekz. f 0.06

Aliaj landoj: jarabono f 1.00.  
(15 Belg. fr. 10 Fr. fr.)

## DE LA ALIA SPECO.

„Ho, jen denove!” Kun granda ĝemo sinjoro Moris eksidis en sia lito. Estis malvarma vintromateno kaj ankoraŭ tre mallume, sed de ekstere li aŭdis teruran kriadon: „Jen mi estas! Halo! Halo!”

Sinjoro Moris batis per la pugno sian kusenon kaj furioze turnis sin. Estis skandalo! Jam dum multaj semajnoj antaŭ la sunleviĝo li aŭdis tiun teruran kriegadon. Unue venis voĉo de malproksime: „Halo! halo-o!” kaj post tio alia voĉo, preskaŭ tuj antaŭ liaj fenestroj, kiu respondis per laŭtega: „Jen mi estas!” Tiam li kuŝis kaj aŭskultis kaj aŭdis ĉiam la plendan „halo”, kiu iĝis ĉiam pli malforta, ĝis fine eĉ liaj bonaj oreloj ne plu kaptis ion.

Kaj, sinjoro Moris ne al kutimiĝis, ho ne, kontraŭe, li jam vekigis antaŭ ol la kriado komenciĝis. Maldorma li kuŝis tiam, atendante la bone konatan kriadon. Antaŭ unu semajno li jam ripetfoje grumblis pro tio, sed nun li estis furioza.

„Mi ne plu toleras tion,” li diris. „Morgaŭ mi scios, kiu li estas, kaj mi komprenigos al li, ke li devas silenti.”

La postan tagon okazis io tre stranga. Je duono post la kvara, kiam estis ankoraŭ mallumege, sinjoro Moris levis sin el la varma lito, kaj li sukcesis vesti sin kaj eĉ surmeti la surtuton, kvankam nur kun granda peno li povis malfermadi la okulojn. Poste li eksidis ĉe la fenestro kaj atendis. Tio daŭris proksimume duonan horon. Tiam komenciĝis la afero. Unue voĉo de malproksime vokis plende kiel noktobirdo „halo!” Kaj tuj poste respondis laŭta voĉo apude: „Jen mi estas!halo! halo!”

Sinjoro Moris, kiu ĵus ekdormetis sur la seĝo, subite vekigis,

iris sur la piedfingroj malsupren, kaj post momento li estis ekstere. La freŝa neĝo krakis sub alvenantaj paŝoj. Moris staris atendante en la ombro de la domo. Jen li vidis en la lumo de lanterno figuron, kiu kuris laŭ la strato kaj suprengrimpis la ŝtuparon de ĉiu domo. „Do la ĵurnalknabo”, li grumblis enbuŝe. „Nu, mi donos lecionon al li, kiam li estos ĉe mi.” Ĝuste kiam la knabo atingis lin, sonis en la malproksimo la „halo”. Sed nun la respondo venis kun stranga trilo, ĉar la parolanto estis terure skuata. Moris ja kaptis lin kaj en la mallumo li kolerege alrigardis lin. „Vi aĉa bubaĉo!” li kriis, „pro kio vi malebligas al ĉiu homo la dormon?”

„Malebligi la dormon?” ekkriis la knabo, kaj lia voĉo esprimis tiom da sincera miro, ke Moris senvole maltenis liajn ŝultrojn.

„Ĉu vi do pensas, ke vi meznokte povas fari tian bruon, „ne vekante ĉiujn homojn en distanco de duona horo?”

„Mi pensis nur pri Toni,” diris la knabeto, „kaj certe pro tio mi ne pensis pri la noktripozo de la aliaj homoj.”

„Kiu estas tiu Toni?” demandis sinjoro Moris malbonhumore. Ne plu skuante la knabon, li sentis nun la egan malvarmon.

„Toni? Nu, li estas mia amiketo. Li ankaŭ devas disporti ĵurnalojn. Sed li ankoraŭ ne tiel kutimas iri tra la mallumo kaj li timas. Tial li krias ĉiam al mi, kaj se mi do respondas, li ree havas kuraĝon.”

„De, tiel!” diris Moris. „Mi pensis, ke vi tiel krias nur pro via propra plezuro.”

En la sama momento aŭdiĝis malforta „halo” de malproksime. Sed ne sonis respondo.

„Respondu do ree, se vi deziras,” diris Moris mallonge. Post tio sekvis laŭta: „Jen mi estas!”

„Ĉu tiu Toni estas parenco de vi?”

„Ne sinjoro, li estas nur mia amiketo. Sed li estas iomete malforta, ĉu vi komprenas? Kaj ĝis nun li ne devis tiel labori. Oĥ, ĉu vi scias? Estas knaboj, kiuj povas zorgi pri si mem, kaj estas knaboj, kiujn oni ĉiam iom devas helpi. Toni estas de la lasta speco, kaj mi estas de la alia.”

„Nu jen,” diris sinjoro Moris, vi do povas voki estonte.”

Kaj poste, kiam li matene ree aŭdis la konatajn voĉojn, li ne plu koleris, sed pensis en si mem: „Li ja estas de la alia speco!”

VANE.

## HEROO!

Iun tagon du knaboj, Georgo kaj Johano promenis laŭ riverbordo. Johano portis fiŝkanon. Georgo ne havis fiŝkaptilon, sed li posedis malgrandan boaton. Li diris al Johano: „Lasu min porti la fiŝkanon.” Johano respondis: „Ne, mi portas ĝin; ĝi estas mia!”

Kiam ili alvenis en la boatejon, Georgo prenis la remilojn kaj saltis en la boaton. Johano sekvis. Georgo antaŭenpuŝis la boaton en la rivermezon. Tiam li diris al Johano: „Ĉi tie estas konvena loko por fiŝkapti. Mi estu la unua, kiu tenas la fiŝkanon, ĉar ĝis nun mi faris la tutan laboron.” „Ne, diris Johano, „la fiŝkano estas mia; mi kaptu la unuan fiŝon. Poste mi liveros la kanon al vi.” „Mi do,” diris Georgo „ne plu permesos, ke vi uzu mian boaton. Donu tuj la kanon al mi, alie mi forprenos ĝin!” Li ĵetis sin sur Johanon, kaj ambaŭ falis el la boato.

Georgo povis naĝi. Li multe deziris savi sin; tial li komencis naĝi al la riverbordo. Post malmulte da tempo li tie alvenis, kaj savis tiel unu knabon. Li estis fiera pri sia granda sukceso kaj pri sia lerta naĝado. Sed dume, Johano baraktis en la rivero, kaj englutis multe da akvo. Bedaŭrinde li ne povis naĝi. Kiam Georgo vidis Johanon, baraktante en la rivero, li pensis: „Kia granda afero, se mi savus du knabojn; tiam mi vere estus heroo!” Tuj li reiris en la akvon, naĝis al Johano, kaptis lin ĉe la haroj kaj trenis lin al la bordo.


Johano diris: „Mi dankas vin, Georgo, sed mi perdis mian fiŝkanon.”

„Mi tamen perdis mian boaton,” diris Georgo, „sed mi ne bedaŭras, ĉar mi savis min mem kaj vin; mi savis du knabojn, mi estas glora heroo!”

Originale verkis Harrod.

Birmingham, Anglujo.

## SORCA TRIANGULO.



a, a, a, b, i, i, o, o, o, o, p, r, r, t, t,

La vortoj signifas, horizontale

kaj vertikale:

1. Parencon.

2. Arbon.

3. Pronomon.

4. Nomon de esperanta litero.

5. Literon.

MARCELO KUN SIA LAMBASTONO.<sup>1)</sup>

Ĉiu en la aleo konas Marcelon, la belgan knabon el la rifuĝejo. Li havas nur unu kruron kaj lambastonon.

Kiam li komence aperis en la strato, la homoj eligis krion pro kompato: „Kia eta kompatindulo! Kaj tamen ankaŭ li devis for-kuri!”

„Aĥ, kia mizera infano, kiu neniam povas ludi kun aliaj knaboj ...!” Sed rilate al ĉi lasta ni eraris. Jam baldaŭ ni miris pri lia lerteco. Li piedpilkudis, la knabo kun unu kruro, li saltis per ŝnuro, li puŝis la etulojn en glitveturilo. Resume, li ludis ĉion kun la aliaj knaboj. Li ege mirigis nin pro sia lerteco. Kaj strange estas, ke oni pli kaj pli atentis lian afablan vizaĝon kun la sinceraj okuloj kaj la afabla rideto, kaj malpli tiun kriplan kruron. Ĉiam li estis same gaja kaj ĝentila, tiu Marcelo.

Antaŭ kelka tempo la rifuĝintaj knaboj faris specialan ludeton. Laŭvice ili prenis la bastonon de Marcelo, kaj poste saltis per unu kruro tra la aleo. Momenton mi opiniis, ke ili volas primoki la malfeliĉulon pro lia kripleco, ĝis mi vidis, kia la afero estas. Marcelo mem pruntedonis sian bastonon al ĉiuj siaj kamaradoj, kaj havis tiam la plej grandan plezuron, kiam ili mallerte rondsaltis per ĝi. Kun triumfa mieno, radianta pro plezuro, li kapmovis al mi, kvazaŭ li volis diri: „Ĉu vi nun vidas, ke mi superas ĉiujn? Tion ili ne povas imiti!” Mi rekapmovis kaj mi pensis: „Jen, forpelita de la hejmo, saltadi tra la mondo per nur unu kruro kaj lambastono kaj ĉiam kun afabla, ĝoja mieno, certe nur malmultaj povas imiti vin, malgranda, brava Marcelo.”

<sup>1)</sup> Tio ĉi okazis en Nederlando en la jaro 1914, kiam dum la mondmilito multaj Belgoj rifuĝis al Nederlando.

## SOLVOJ EL LA 8a NO.

kvar,  
vere,  
arte,  
reen.

k	v	a	r
v	e	r	e
a	r	t	e
r	e	e	n

B. REICHBERG

ondo,  
nia,  
da,  
o.

o	n	d	o
n	i	a	
d	a		
o			

Riga, Letlando.

## POR KOMENCANTOJ. LA KOLBASO!

Du laboristoj dumtage laboris en arbaro. Ili faligis arbojn. Ĉar tiu ĉi laboro estas tre peza, ili fine estis tre lacaj. Ili soifis kaj malsatis. Unu iris al proksima fonteto kaj revenis kun kruĉo da pura akvo. Li kaj lia amiko tre avide trinkis freŝan trinkaĵon. Poste ambaŭ manĝis pecegon da grenpano. La nigra pano estis malmola kaj seka. .... Sekve Joĉjo diris: „Se mi nun povus deziri, mi petus grandan kolbason, kiu estas tiel longa kaj dika kiel mia brako.” .... „Kaj certe vi donus al mi la duonon de via kolbaso”, respondis Miĥaelo. „Tute ne”, rediris Joĉjo, „mi mem manĝus la tutan!” ..... „Vi estas tre malbona amiko! Avarulo! Eĉ ne peceton vi donus al mi?” demandis Miĥaelo. .... „Ne, eĉ ne unu peceton,” respondis Joĉjo, „Se vi ankaŭ volas manĝi kolbason, mem deziru grandegan kolbason.” Miĥaelo trovis, ke lia amiko tute pravas kaj ambaŭ ne plu disputis, sed pace kaj kontente manĝis sian panon sen kolbaso.

Laŭ germana rakonto nuntempa,  
J. WIESBOCK, Aŭstrio.

Legu kelkfoje la rakonton kaj respondu al la demandoj:

Kie laboris la laboristoj? Kion ili faris? Ĉu tiu laboro estas peza? Kion ili fine estis? Kien unu iris? Kion li alportis? Kion ambaŭ manĝis! Ĉu tiu pano bongustis? Kion diris Joĉjo? Kion respondis Miĥaelo? Ĉu Joĉjo donis la duonon al Miĥaelo? Kial ne? Kial ili ne plu disputis?

---

## KIU KUNMANĜAS?

Viando de antaŭ 10.000 jaroj por tagmanĝo!

Pro la reveno de scienca ekspedicio el Norda-Siberio, oni donis tagmanĝon en Stokholmo. Dum tiu tagmanĝo oni alportis viandon de mamuto, kiun la ekspedicio sub la gvidado de Profesoro Lindbergh trovis apud Taiga, tute enfrostita en la glacio.


La viando de la besto estis bonege konservita, kaj la ekspedicio sendis parton de ĝi al Stokholmo.

Laŭ preciza esploro montriĝis, ke la viando estas ankoraŭ bone uzebla. Sekve oni preparis el ĝi manĝaĵon, kiun oni dum la festeno prezentis al la gastoj.

Ŝajnas, ke la pra-historia viando bonege gustis al la sinjoroj!

West-Graffdijk

N. K.



### LA OKA LECINO.

- |            |              |             |
|------------|--------------|-------------|
| 1. plumo   | 8. kolombo   | 15. branĉo  |
| 2. flugilo | 9. kolombejo | 16. trunko  |
| 3. beko    | 10. heliko   | 17. ĉevalo  |
| 4. vosto   | 11. papilio  | 18. falĉilo |
| 5. fosto   | 12. lignoŝuo | 19. bandaĝo |
| 6. kuniklo | 13. folio    |             |
| 7. plado   | 14. greno    |             |

Al multaj francoj ni sendas specimenon kun abonilo. Ili povas pagi al: S-ro Matthie, Dijon, 27 Place de la République, Cote d'Or. ĝironumero: Cheque postal No. 12025 Dijon (Côte d'Or).

**Ne prokrastu ĝis morgaŭ,  
Kion vi povas fari hodiaŭ.**

## EN LA KORTO.

Estas **mateno**. La vetero estas tre bela. Manjo staras en la korto. Si loĝas en granda **farmdomo**. Malantaŭ la domo estas la korto.

Tie vivas multaj bestoj. Ĉiuj estas bonaj kamaradetoj de la **ĉarma** knabino, kiu nun **parolas** al ili. La bestoj respondas: La porko **gruntas**, la kokino **klukas**, la kolombo **kveras**. La kunikloj ne respondas. Ili **manĝas** kaj manĝas. La freŝaj folioj **bongustas** al ili. La **malrapida** heliko **rampas** sur la muro. Ĉiuj estas ĝojaj, **escepte** la porko. Ĝia piedo estas **malsana**. Ĉirkaŭ ĝi estas bandaĝo. La ĉevalo ne **povas** esti en la korto. Ĝi **devas resti** malantaŭ la muro.

La patro de Manjo estas **terkulturisto**. Granda ĉapelo estas sur **lia** kapo, kaj **ŝirmas kontraŭ** la sunradioj. Li **falĉas per** falĉilo. La greno falas sub la **fortaj svingoj**. Baldaŭ li estas **preta**. La patrino **jam** vokas: „**Venu por manĝi!**”

- a. Kopiu la frazojn en vian kajeron.
- b. Traduku la frazojn en vian gepatran lingvon.

Oni falĉas per falĉilo. Oni veturas per veturilo. Oni manĝas per manĝilo. Oni fosas per fosilo. La birdo flugas per flugiloj. La ĉapelo estas ŝirmilo kontraŭ la suno. La infanoj ludas per ludiloj.

**Vi** staras ĉe la kolombejo. **Via** kolombejo estas bela.

**Mi** legas en libro. **Mia** libro estas interesa.

**Li** estas en la ĉambro. **Lia** ĉambro estas granda.

**Ŝi** ludas en la korto. **Ŝiaj** haroj estas nigraj.

**Ili** laboras en la kampo. **Ilia** laboro estas bona.

La piedo de la porko estas malsana. Ĝia piedo estas malsana.

- a. Traduku la frazojn en vian gepatran lingvon.
- b. Post kelkaj tagoj traduku la frazojn en esperanton.

Kia estas la vetero? Kie loĝas Manjo? Kiu staras en la korto? Kio vivas en la korto? Ĉu la bestoj estas kamaradetoj de la knabino? Ĉu ŝi ankaŭ parolas al ili? Ĉu la bestoj respondas? Ĉu la kunikloj ankaŭ respondas? Ĉu la folioj bongustas al ili? Kie rampas la heliko? Ĉu la bestoj estas malgojaj? Ĉu ĉiuj bestoj estas ĝojaj? **Kial** la porko ne estas goja? Kio estas ĉirkaŭ la piedo? Ĉu la ĉevalo ankaŭ estas en la korto? Kio estas la patro de Manjo? Kio estas sur lia kapo? Per kio falĉas la patro? Kie falas la greno?

Respondu al la demandoj.

## AL SENDINTOJ DE VERKAJOJ.

*E. E. Yelland, Aspremont, Franclando:* Vi klare rakontis kiel la akcidento okazis. Nun mi havas vian unuan sendaĵon, kiom da verkaĵoj sekvos?

*S. Kool, West-Grafdijk:* Vi bone rigardis la bildojn, kaj sufiĉe bone rakontis, kion okazis. Tamen la litero *W* ne ekzistas en Esperanto.

*Esp. Grupo Zwettl, Aŭstrujo:* Ni enpresigos vian verkaĵon en sekvontan numeron Ni jam sendis kantaronojn al vi.

G. v. T.

---

## KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO?

1. Aperis artikoloj aŭ notoj pri „La Juna Vivo” en: Nederlanda Katoliko No. 7”, „Nederlanda Esperantisto No. 21”, „Oomoto”, „Le Travailleur Esperantisto” No. 23, „La Semanto”, No. 7. „Bulteno de la Lab. Ligo en Ĉeĥoslovakujo”, „Informilo de Zamenhof Instituto”, No. 30, „Bulteno de „The Friends’ Esperanto Society,” No. 32, „Scienca Gazeto”, No. 5.

2. La jenaj novaj grupoj abonis la gazeton por ĉiuj, aŭ preskaŭ por ĉiuj anoj: **Nederlando:** St. Annaparochie (Fr.), Breezand, Scharmer (Gr.), Breukelen, Assendelft, Den Helder.

**Francujo:** Buxières d’ aillac (Indre).

**Svedlando:** Ljugarn.

3. Se oni tradukas artikolojn el „La Juna Vivo”, ne forgesu mencii sub la verkaĵo: „El La Juna Vivo”, internacia esperantogazeto por la junularo kaj komencantoj. Sendu ĉiam du ekz. al la redakcio.

---

## KORESPONDADO.

1. K. Sofia, Bulgarujo: La enhavo estas tro malfacila.
2. V. Valencio, Hispanujo: Mi ne tute komprenas vian rakonton.
3. O. R. Martin, Ĉeĥoslovakujo: La rakontoj estas tro simplaj.
4. T. L. Präsebö, Svedujo: Preskaŭ la saman rakonton mi jam ricevis antaŭ kelkaj monatoj de Emma Osmond. Ŝi verkis ĝin por „Brita Esperantisto.”
5. W. Rotterdam, Nederlando: La historio estas tro komplikita.

<b>KORESPOND-ADRESOJ:</b> ĉiu vorto: 0.03 gld.
------------------------------------------------

**DANLANDO:** 60 komencantoj, inter kiuj 12 geinstruistoj, deziras korespondi kun eksterlandaj geamikoj. Skribu al: F. ino M. Halse, Algade 22, Nyköbing Mors.

**Ĉeĥoslovakujo:** Mi serĉas gekorespondantojn en la tuta mondo. Mi ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn kaj glumarkojn. Respondo garantita. Ladislav Svobodo, Velkozavod kvĕtinársky, Plzen „U Zvonu.”